La klasika profesoro tre okupis mian tempon; li ja estis vera kankro."

"Mi ne lernis de li" diris ĝemante la Falsa Kelonio. "Oni diris ke li instruis la Ratinan kaj Blekan lingvojn. Ĉu mi estas prava?"

"Tute prava" diris la Grifo, ankaŭ ĝemante, kaj pro la dolorigaj memoraĵoj ili ambaŭ kovris la vizaĝojn per la piedaĵoj.

"Kaj kiom da horoj ĉiutage vi studis en la lernejo?" Alicio faris tiun demandon en la celo kiel eble plej rapide enkonduki novan paroltemon.

"Dek horojn" respondis la Falsa Kelonio "en la unua tago, naŭ en la dua kaj tiel plu."

"Jen tre kurioza aranĝo" diris Alicio.

"*Nu, ligiĝis* kun tiu 'kurioza' aranĝo" aldiris la Grifo "unu tre ŝatata konsekvenco; ĉar en la dekunua tago *nuligiĝis* ĉiuj lecionoj."

"Ĉu vi volas komprenigi" diris Alicio tre mirigite "ke en la dekunua tago la lernejanoj havis la tempon tute libera?"

"Certe" diris la Falsturto.

"Kaj kio okazis en la dekdua tago" Alicio vigle demandis.

"Jen sufiĉe pri la lecionoj" la Grifo interrompis ŝin tre firme. "La Falsa Kelonio nun rakontos al vi ion pri la ludoj."

# ĈAPITRO X

## La Omara Kvadrilo

La Falsa Kelonio profunde ekĝemis, kaj tiris la postan flankon de unu piedaĵo trans la okuloj. Li fikse rigardis Alicion kaj forte penis paroli, sed liaj plorĝemoj dum kelkaj minutoj neebligis la parolojn.

"Li kondutas same kvazaŭ li havas oston en la ĝorgo" diris la Grifo kaj tuj klopodis (per fortoj skuoj kaj manfrapoj sur la dorson) eligi la oston. Fine la Falsa Kelonio regajnis la voĉpovon, kaj kun larmoj glitfalantaj sur siaj vangoj komencis:

"Eble vi ne loĝis longan tempon sub la maro (Alicio intermetis 'Mi neniam') eble ankaŭ vi neniam estas prezentita al Omaro — (Alicio komencis diri 'Mi unufojon gustumis—' sed rapide haltigis sin kaj diris anstataŭe 'Mi neniam') — do vi eĉ ne povas imagi, kia rava afero estas la Omara Kvadrilo."

"Mi devas konfesi ke ne" diris Alicio. "Kiaspeca ĝi estas?"

"Nu" la Grifo respondis "oni komence formiĝas en unu rangon laŭ la marbordo ——"